# TEJO-aktuale: numero 381, 2014-05-02

## Komenciĝas dua fazo de konsultado de la strategio de TEJO - bonvolu kontribui!

Jen ni prezentas al vi la unuan, skizan rezulton de la konsultado de la trijara strategio de TEJO 2014-2017. Ĝis la fino de marto ni kolektis proponojn pri celoj ordigitaj laŭ la 4 K-agadkampoj: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo, Kunordigo (detalojn vidu ĉe la antaŭa enskribo). Ni ricevis multajn interesajn kontribuojn, kiuj estis tre diversecaj – iuj tre vastaj, aliaj tre specifaj, ceteraj ie en la mezo; iom el ili kovris unu la alian, aliaj tute ne. Tio klare montras malsamecon de bezonoj, kiujn oni havas en TEJO. Legu pli: http://tejo.org/eo/node/1568

## TEJO alvokas por prelegi pri scienco dum IJK

Ĉu vi volas prezenti viajn studojn dum IJK? Novtipa programero okazos, dum kiu junaj sciencistoj, esploristoj, kaj fakuloj prezentos siajn kampojn en 5-10 minutoj. Ni invitas ĉiujn partopreni – simple sendu trifrazan priskribon al ni ĝis la 15a de majo. Jen ekzemplo:

La danĝeroj de intensiva bredado. Intensiva bredado de bestoj estas bezonata se la kreskanta homaro ne ŝanĝas sian kutimon pri viandmanĝado. Dum mia prelego mi parolos pri la efiko de intensiva bredado al la sano kaj vivo de la bestoj kaj homoj.

Se vi ŝatus partopreni sed ne scias kiel prelegi pri via kampo, mankas al vi esprimoj aŭ lerto pri tiel prelegi, indiku tion en via mesaĝo, kaj vi ricevos helpon. Por demandoj, aŭ por proponi prelegon, bonvolu kontakti la organizantojn ĉe sfaijk2014 ĉe tejo.org.

## Kreanto(j) de la nova retejo de TEJO serĉata(j)

TEJO nepre bezonas novan retejon, kiu estu:

- alloga

- facile superrigardebla

- redaktebla de pluraj (nefakaj) personoj

havu kaj statikan kaj nestatikan parton:

- la statika parto (t.e. relative konstanta enhavo) estu plurlingva

- la nestatika (t.e. novaĵoj) estos baze nur en Esperanto

Kandidatiĝu plej malfrue ĝis la 15a de majo sendante retmesaĝon al novaretejo ĉe tejo.org - la kandidatiĝoj estos traktitaj laŭeble plej rapide kaj tuje. La plej gravaj ecoj taksataj estos:

- tempo en kiu estos realigita la retejo (bv. prezenti iun tempoplanon)

- sperto de la kreanto (bv. prezenti ekzemplojn de via ĝisnuna laboro)

- kosto de laboro (bv. ne inkluzivi kostojn de ŝablono, servilo ktp., sed nur laborkostojn)

Dum sia lasta kunsido la estraro de TEJO laboris pri tiu temo kaj havas jam kelkajn aferojn pretaj. Temas pri baza strukturo de la retejo kaj provizore elektita ŝablono por la retejo (ĝi ne nepras, sed plej facilas, ĉar ĝiabaze ni laboris pri la strukturo). Havante spertojn kun diversaj sistemoj kaj ilia uzantamikeco, ni havas ioman preferon al retejo en WordPress kaj fortan malpreferon al retejo en Drupalo. Kompreneble tamen elekto de sistemo estas ankoraŭ diskutebla - ni bonvenigas argumentojn por de vi preferata elekto.

La laboro konsistos el:

- starigo de unu plurlingva ĉefretejo de TEJO surbaze de enhavmastruma sistemo kaj grafika ŝablono (kun eventalaj laŭbezonaj modifoj de la ŝablono)

- transmeto de informoj el la malnova retejo al la nova (kun gvido/helpo de TEJO-volontulo kaj de estraro)

- starigo de apartaj nur esperantlingvaj subpaĝoj (nepre samsistemaj, prefere sam- aŭ simil-ŝablonaj) por “Aktivula trejnado”, “Eksteraj rilatoj” kaj “Scienca kaj faka agado”, kune kun transmeto de informoj el la malnova retejo kaj vikio (kun gvido/helpo de TEJO-volontulo kaj pria estrarano)

- eventuala laŭbezona helpo kaj/aŭ riparo de eraroj en komenca periodo de mastrumado de la retejo (iusence kiel garantio dum tiu periodo, kiam oni komencas labori kun la nova retejo)

### Muzikrenkontiĝo FESTO, Pont-de-Barret (26), Francio, 16a ĝis 23a aŭg 2014

FESTO estas festivalo pri muziko kaj kulturo organizita de francaj junaj esperantistoj (JEFO). Ĝi okazas ĉiu jare dum aŭgusta monato en Okcidenta Eŭropo.

Tiu festivalo kunigas homoj de ĉiu aĝoj kaj landoj ĉirkaŭ komuna amo por muziko, interŝanĝo, kaj revo de mondo sen limo. Se Esperanto estas internacia lingvo, muziko estas internacia gusto kaj estas dum FESTO ke kuniĝas ambaŭ esparantoparolantojn kaj lokajn muzikgrupojn por miksiĝi.

Sed FESTO ne konsistas nur en koncertoj : dum la tago okazas muzikatelierojn, artistajn, sportajn, sociajn kaj socialajn, kulturajn kaj lingvistikajn kaj ankaŭ kulturalajn kaj turismajn ekskurojn...

Dum nokto, vivo daŭrigas kun diskoteko, drinkejo-trinkejo kaj gufujo (ĉi-jare apud kampofajro), lokoj favoraj por amuziĝi, babili kiel refari la mondon kun revoj de ĉiuj.

Ĉi-jare 2014, FESTO konos la kuniĝo de movadoj esperantistaj, veganaj kaj okcitanistaj interalie. Partoprenantoj spertos riĉecon de interŝangoj. Kaj eble, fine de la semajno, kelkaj estos anoj de la tri movadoj!

Do rendevuo en Pont-de-Barret en Provencala Dromo (departemento 26) de la 16a al 23a de aŭgusto 2014 inter Montélimar, Crest en Dieulefit lando. Francio.

Aliĝilo kaj informoj sur la retejo de Festo: http://www.alesk.eu/festo2014/eo

### E@I-blogo: Iĝu staĝanto ĉe E@I ĉi-somere!

Ĉu vi studas ĉe universitato en EU, EEA, Svisio aŭ Turkio pri informadiko, kognaj sciencoj, lingvistiko, pedagogio, ĵurnalismo, ekonomio, arto aŭ alia fako? Legu pli: http://blogo.ikso.net

### ROY MCCOY NOVA KOMISIITO PRI PASPORTA SERVO

En sia aprila kunsido en Norda Italio, la Estraro de TEJO nomumis Roy McCoy kiel Komisiiton pri Pasporta Servo. McCoy emeritiĝis pasintdecembre kiel longtempa redaktoro de la Jarlibro kaj prespretigisto de aliaj eldonaĵoj en la Centra Oficejo de UEA. Li pretigis por presado interalie la lastajn du adresarojn de Pasporta Servo (2010 kaj 2011). McCoy akceptis la taskon kun la kondiĉo ne esti ligita al antaŭe fiksitaj limdatoj. Li tamen kredas, ke papera eldono de la adresaro povos esti preta por presado ĝis la fino de junio.

Ankaŭ plena refunkciigo de la reta Pasporta Servo estas antaŭvidata relative baldaŭ. Volontulo en Usono estas nun laboranta pri la ĝisdatigo de ĝia sistema softvaro. Alia volontulo estas serĉata por la kreado de mapoj, dum la landaj PS-organizantoj estos enplektitaj en la pridatenaj laboroj.

Roy McCoy estas kontaktebla ĉe (roymccoy.nl ĉe gmail.com)

(Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 542, 2014-05-02) Legu pli: http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=542#1

### DU STIPENDIULOJ DE UEA STUDOS TERMINOLOGION EN VIENO

En konkurso de UEA, Aida Čižikaitė el Litovio kaj Ariadna García Gutiérrez el Kubo gajnis subvencion por vojaĝo al Vieno kaj partopreno en la terminologia somerlernejo, kiun la internacia terminologia reto TermNet okazigos de la 14-a ĝis la 18-a de julio.

Laŭ Mélanie Maradan, komisiito de UEA pri terminologiaj instancoj, la konkurso allogis sep partoprenantojn, el kiuj unu devis retiriĝi pro aliaj planoj. "La prijuĝo de la dosieroj estis tre malfacila pro la elstara kvalito de pluraj dosieroj", rakontas Maradan.

Por kuraĝigi ilin al plua terminologia aktivado oni aljuĝis libropremiojn al la kvar aliaj konkursantoj. (Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 542, 2014-05-02) Legu pli: http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=542#3

### Konkurso de Esperanto-muziko

TEJO kaj ĝia revuo Kontakto anoncas konkurson pri novaj Esperantaj kantoj kaj -muzikaĵoj. Unu el la premioj estos aljuĝita laŭ publika voĉdonado!

Per la moderna teknologio multaj homoj havas jam la eblon verki kaj mem registri Esperantan muzikon, kantojn. Pro la bunteco de la muzika ĝenro ekde la pasinta jaro ĝi ne plu estas traktata kiel branĉo en la tradiciaj Belartaj Konkursoj de UEA, sed estas organizata aparta Muzika Konkurso sub la ŝildo de TEJO.

La Muzikan Konkurson teknike organizas la revuo Kontakto, ĝin subtenas Universala Esperanto-Asocio kaj la Esperanta muzikeldonejo Vinilkosmo. La konkurso havos du kategoriojn: “Kanto de la Jaro” resp. “Albumo de la Jaro” – rajtas ĝin partopreni iu ajn, - ankaŭ per memfaritaj aŭ neeldonitaj registraĵoj.

– La konkurso "Kanto de la Jaro" aljuĝos tri premiojn. La unuan kaj la duan lokon aljuĝos la ĵurio. La trian premion, nome la premion de la publiko aljuĝos la ordinara publiko per publika voĉdonado. La unua loko por la "Kanto de la Jaro" ricevos premion de 200 EUR, la dua loko 100 EUR kaj la premio de la publiko 100 eŭrojn.

– La konkurso "Albumo de la Jaro" premios unu konkursaĵon. La premiita konkursaĵo ricevos 200 EUR kiel premion.

Por alsendi la konkursaĵojn limdato estas la 31-a de majo de ĉiu jaro. Kontakta adreso de organizantoj por ĉiuj demandoj: "muzikakonkurso ĉe tejo.org"

Detala regularo kaj aliĝilo de la Muzika Konkurso estas trovebla ĉe: http://kontakto.tejo.org/p/regularo-de.html

Temas pri la unua jaro, unua konkurso, do estus grave, ke kiel eble plej da homoj eksciu pri la nova projekto. Ni sincere dankas al vi, se vi helpas diskonigi tiun ĉi konkursan alvokon!

### Esperanto — Free Software Foundation —.kunlaboro por libera softvaro

Pro subtenado de libera dosierformo OGG Vorbis estis VINILKOSMO "Esperanto-Muzik-Prod." kaj Muzaiko listigitaj en la retejo de @Free Free Software Foundation. Legu pli: http://www.fsf.org/campaigns/playogg/sites/esperanto

### Venontaj renkontiĝoj

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 17a de majo 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/
TRIA TUTMONDA EKZAMENTAGO LA 17-AN DE MAJO, http://edukado.net/novajhoj?id=421
Staĝo por lernado de la lingvo, pluraj niveloj kun kuba esperantisto Miguel Angel Gonzales, 20a-24a de majo, KVINPETALO Esperanto-Centro, informoj @ kvinpetalo.org (forigu la spacojn) aŭ http://kvinpetalo.org/
Kongreso de Espéranto-France, Chambéry, Francio, 29-a de majo ĝis la 1-a de junio 2014
64a Studsesio (ĉeftemo Esperanto-muzikkulturo), Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, Germanio, 29a de majo ĝis 1a de junio, http://esperanto-urbo.de kaj http://ic-herzberg.de
MARO, Mara Renkontiĝo, apud St. Tropez , Mediteraneo, Francio, ĉ. 31-a de majo ĝis 14-a de junio 2014, http://www.esperantoland.org/eo/kontakto.html
91a Germana Esperanto-Kongreso (GEK), Erfurt ; Germanio, 6a ĝis 9a de junio 2013, http://www.esperanto.de/gek
Amika Tago, Mulhuzo, Francio, 14a de Junio 2014, Por pliaj informoj kontaktu Manfred (manfred ĉe westermayer.de)
Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 21a de junio 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/
Roskilde Festivalo 2014, Roskilde, Danio, 28a de junio ĝis 6a de julio 2014, http://roskilde.festoklubo.dk/rf14 aŭ https://www.facebook.com/events/204648439659455/
Semajnoj de Esperanto-Perfektigo (SEP) - intensaj lingvokursoj kaj instrukapabliga, metodika trejnado, klerigado. 65a Studsesio, klerigado en formo de blokseminario. STIPENDIOJ peteblaj!!, Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, Germanio, 19a de julio ĝis 3a de aŭgusto, http://esperanto-urbo.de kaj http://ic-herzberg.de
La 50-aj BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ (BET-50), Jelgava, Latvio, 28-a de junio ĝis la 5-a de julio 2014, http://www.esperanto.lv/index.php/lang-eo/la-50-aj-baltiaj-esperanto-tagoj-bet-50
INTERNACIA ESPERANTO SEMAJNO (IES), Erevan, Armenio, 28a de junio ĝis 4a de julio, http://aresun.weebly.com/
Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj., Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 29a de junio ĝis 6a de julio, http://gresillon.org/s2
Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK-2014), Viktorio, Brita Kolumbio, Kanado, 29-an de junio ĝis la 8-an de julio, Ellen M. Eddy (eddyellen ĉe aol.com) aŭ http://nask.esperantic.org
SoRen 2, Tam Đảo, Vĩnh Phúc, Vietnamio, 5a kaj 6a de julio 2014, https://www.facebook.com/events/449892891777696

10-a kongreso de Europa E-Unio, Rijeka Kroatio, 6a ĝis 12a julio 2014, Eŭropa Esperanto-Unio LKK, (eeu ĉe europo.eu) kaj http://eeu-kongreso.webnode.com/
Somera Esperanto-Studado 2014, Nitra, Slovakio, 12a ĝis 20a de julio, http://ses.ikso.net
Karioka Renkontiĝo (KoRo), Rio de Ĵanejro, Brazilo, 14a ĝis 18a de julio 2014, http://koro.brazilo.net/ aŭ http://tinyurl.com/koro-rio
70a IJK 2014, Fortalezo, Brazilo, 18-a ĝis la 25-a de julio 2014, https://www.facebook.com/ijk2014 aŭ http://ijk.brazilo.net/ aŭ http://www.tejo/ijk
12-a SOMERE, Dahlem-Baasem, Germanio, 23-a de julio ĝis 6-a de aŭgusto 2014, http://www.esperantoland.org/somere
25-a Internacia Junulara Semajno, Horány, Szigetmonostor, Hungario (nur 10 kilometrojn for de Budapeŝto), 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto, https://www.facebook.com/events/264440613710468
99a Universala Kongreso, Bonaero, Argentino, 26a de julio ĝis 2a de aŭgusto 2013, http://uea.org/kongresoj
Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso., Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 1a ĝis 9a de aŭgusto, http://gresillon.org/s3
87-a SAT-Kongreso 2014, Dinano (Francio), 9a ĝis 16a de aŭgusto 2014, http://www.satesperanto.org/
Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto., Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 9a ĝis 17a de aŭgusto, http://gresillon.org/s4
24-a KISO (Kafoklaĉa Internacia Somera renkontiĝO) por „ludi, krei, sperti vin mem”, Marburg, Germanio, 10-a ĝis 17-a de aŭgusto 2014, http://www.esperanto.de/kiso
Somera Esperanto-Studado 2014, Mendeleyevo, Rusio, 17a ĝis 25a de aŭgusto, http://ses.ikso.net
SUNO KAJ MONTOJ - 81-a Itala Kongreso de Esperanto, Fai della Paganella, Trento, 23a ĝis 30a de aŭgusto 2014, http://kongreso.esperanto.it
25-a MontKabana Renkontiĝo (MKR), Sillian, Aŭstrio, 18-a ĝis 21-a de septembro 2014, http://keja.hr/mkr/aliĝu-al-mkr/
30-aj ARtaj KONfrontoj en Esperanto (ARKONES), Poznan, Polando, 26a ĝis 28a de septembro, http://arkones.org
TORPEDO-9, 66a Studsesio (semajnfino pri Esperanto-instruado) + Esperanto-Filmfestivalo, Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, Germanio, 2a ĝis 5a de oktobro, http://esperanto-urbo.de kaj http://ic-herzberg.de
2a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA), Germanio, 19a ĝis 24a de oktobro 2014 sur la migrovojo "Moselhöhenweg". http://www.esperanto.de/ema
AUTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj., Esperanto-kastelo Greziljono, Grésillon, Francio, 24a de oktobro ĝis 1a de novembro, http://gresillon.org/
Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu